

INTERNACIA

PEDAGOGIA REVUO

IPR

**Eldonata de Internacia Ligo
de Esperanto-Instruistoj**

ILEI

Jarkolekto 7

N-ro 2, 1977

Pizo, Italujo

enhavo

<i>Prof. Alessandro Bausani</i> – Historia panoramo de interlingvistiko kaj lingvistika valoro de esperanto	paĝo	25
<i>Flava Alaŭdo</i> – Preĝo – tradukis prof. Mario Dazzini	”	41
*** – 11a internacia konferenco de Ilei – programo	”	42
*** – Ĉu esperanto en la eŭropa komunumaro?	”	44
<i>Zsolt Gyarmantby</i> – La hungaraj konkursoj	”	45

historia panoramo de interlingvistiko kaj lingvistika valoro de Esperanto

Artikolo de prof. d-ro Alessandro Bausani, Romo, Italujo. El n-roj 82 ĝis 85 de «Monata Cirkulero de KCE – Kultura Centro Esperantista», postiers 27, Le-Chaux-de-Fonds, Svisujo.

O. Enkonduko (de Tazio Carlevaro).

Alessandro Bausani, fama itala lingvisto, naskiĝis en Romo en la jaro 1921-a. Li estas katedra profesoro de islamistiko kaj ĝis 1976 li estis direktoro de la Orienta Lernejo ĉe la Roma Universitato. Li apartenas al la itala «Accademia dei Lincei» (kie li membris kun alia esperantisto, la lingvisto Bruno Migliorini): tiu akademio iom paralelas je la Franca Akademio. En junio 1976-a pro kulturaj meritoj, li ricevis la italan Nacian Premion rekte el la manoj de la itala prezidento Giovanni Leone.

Li estas nelacigebla vojaĝemulo: escepte de Islando, Rumanio, Bulgario, Andoro kaj Lihtenŝtejno, li vizitis ĉiujn eŭropajn landojn. Plue, li estis en la kaŭkazaj sovetaj respublikoj, en Sirio, Irako, Turkio, Libano, Israelo, Adeno, Egiptio, Maroko, Irano, Afganistano, Pakistano, Hindunio, Tajlando, Singapuro, Malajzio, Indonezio, Aŭstralio, Novkaledonio, Figiio, Tahitio, Ĉilio, Peruo, Argentino, Brazilio, Meksiko, Usono. Li estis eĉ en Pask-insulo. Onidire, dum mondvojaĝo li decidis halti tie «por lerni la lokan lingvon» dum unusemajna restado!

Laŭ ies rakonto, kiam oni demandis al la fama dana lingvisto Otto Jespersen, kiom da lingvoj li scipovas, li respondis, ke li konas apenaŭ la danan (kaj ke tio sufiĉas por esti bona lingvisto). Verŝajne prof. Bausani ne konsentus kun tiu respondo. Fakte, li scias (kaj por li «scii» signifas sentekste prelegi) la italan (nature!), la anglan, la francan, la germanan, la hispanan, la portugalajn, la araban, la turkan, la persan, la urduan kaj la indonezi-malajan. En «privata diskuto» li povas kröme utiligi la latinan, la grekan, la hebrean, la sanskritan, la pahlavian (pra-iranajn), la rusan, la norvegan kaj la baskan. Per vortaro li povas kompreni la jidiŝan, la polinezian, kaj la skandinaviajn kaj slavajn lingvojn. Fine, li havas bazajn sciojn de la keĉua (modern-inkaa), de la nahŭatla (modern-azteka) kaj de pluraj uson-indianaj lingvoj.

Unuavide, tiu lingvoscio aspektas preskaŭ superhoma, ankaŭ por profesia lingvisto. Oni povus imagi, ke tia plurlingvulo ion certe ne bezonas:

Esperanton. Sed male: malgraŭ la fakto, ke li bedaŭras sian nescion pri la finna, la hungara, la sudanaj kaj la bantuaj lingvoj, li tamen lernis Esperanton, kiun li tre bone regas.

Lingvistoj, onidire, okupiĝas pri lingvoj. Sed prof. Bausani opinias, ke la scio je lingvo estas tutsimpla komenciĝo je pli profunda studo: nome je la studo de la kultur-historio (literaturo, religio, kutimoj, tradicio, historio, vivmaniero) de la popolo, kies lingvon oni lernis. Mi memoras ion kuriozan. Mi troviĝis, dum iu aparte hela nokto, en Rimini, apudmare, kun li kaj kun amiko (ankaŭ lingvisto). Subite li indikis al ni stelon kiu brilis aparte metalece, kaj informis nin, ke tiu stelo estas fakte planedo: Jupitero. Tiam naskiĝis diskuto (sed fakte: ni demandis, kaj li respondis) pri mezepoka araba astronomio, pri la naskiĝo de trigonometrio ĉe la araboj, kaj la eraroj pri traduko, kiun faris la eŭropanoj koncerne la araban trigonometrikan terminologion, kaj fine li bedaŭris, ke, lekciante pri mezepoka araba geometrio, li ne nur havis malmulte da lernantoj (ĉar ŝajne la plejmulto ne interesiĝas pri tiuj temoj, eĉ en orientalistika universitatsekcio), sed ankaŭ ke la trigonometriaj scioj en la nuna juna generacio estas vere malmultaj. Miriĝite, mi poste demandis al lia kolego, ĉu tia enciklopedia erudicio estas kutima ĉe italaj lingvistoj. Laŭ li, temas pri apartaĵo de prof. Bausani. Ŝajnas, cetere, ke la moderna generacio de lingvistoj tro specialiĝas en apartaj branĉoj (ankaŭ ili!), tiel ke fine al ili riskas manki ĝenerala superrigardo.

Lia scienca kontribuado pri interlingvistiko estas laŭnombre malgranda, sed laŭenhave interesa kaj densa. Ni rimarkas: *Le lingue inventate* (Ubal dini, Toma, 1974: de ĝi ekzistas germana traduko: *Geheim- und Universal sprachen*, aperinta ĉe Kohlhammer, Stuttgart, 1970); *Traduzione e innovazione nelle lingue dei nuovi paesi asiatici* (aperinta en la kolekto redaktita de R. Corsetti: *Lingua e politica*, Officina, Roma, 1976); *Lingue artificiali e lingue universali* (en: «Scientia» LX, 11-12 [1966]); *Origine del linguaggio od origine delle lingue attuali?* (en: «Scientia» LVIII [1963-1964]); *About a Curious «Mystical» Language: Balaibalan* (en: «East and West», organo de I.S.M.E.O., Roma).

Pri lingvistiko kaj pri la kulturhistorio aperis libroforme la jenaj gravaj verkoj: *Corano* [*Korano*] (traduko, enkonduko kaj notoj, 1955), *Le quar-tine di Omar Khayyam* (1956), *L'opera poetica di Avicenna* (1956), *Testi religiosi zoroastriani* (tradukita el la pahlavia: 1957), *Persia religiosa* (1959), *Storia della letteratura persiana* (1960), *I persiani* (1962: tradukita germanen ĉe Kohlhammer), *Malesia: poesia e leggenda* (1963), *Il Poeta Celeste di M. Iqbal* (tradukita el la urdua kaj el la persa, 1965), *Le sette principesse di Nezami di Gangè* (1967), *Letteratura del Sud-Est asiatico* (1970), *Buddha* (biografio: eldonita en Chiasso far-de Scanziani en 1973).

La artikolo, kiun ni prezentas al vi, estas fakte la teksto de prelego verkita en 1971, kaj prezentita okaze de la fermo-ceremonio de Esperanto-kurso ĉe la Filologia Rondo de Milano. El la lingva vidpunkto, ĝi estas preskaŭ senŝanĝa: mi aliigis ion kaj tion ie kaj tie nur por plifaciligi se necese la komprenon. Atenta leganto facile rimarkos, ke la lingvaj tezoj de prof. Bausani koncerne la evoluon de la internacia lingvo praktike koincidas kun tiuj de Claude Piron. Ne povas esti hazardo, se ili koincidas: tio, laŭ mi, reprezentas ion gravan. Fakte, temas pri du specialistoj pri lingvoj (parte) ekster-eŭropaj — sed ili ne specialistas pri la *samaj* lingvogrupoj. Kaj tamen, cetere ne konante unu la alian, ili atingas analogan konkludon.

1. Signo, lingvo, planlingvo

Itala lingvisto, kiu mortis antaŭ kelkaj jaroj, Mario Lucidi, tiel skribis en unu el siaj artikoloj: «Por bone kompreni la amplekson de la fenomeno, kiun ni nomas «lingvo», oni povus konsideri du limokazojn: unuflanke *interjekcion*, kiu estas io havanta esprimoplenan valoron, io esenca en la viva fariĝo de ĉiu lingvo, sed iel fremda al la lingvosistemo... aliflanke *formulon* de alta matematiko, kiu estas io tute semantika, t.e. signifanta, sed en kiu la subporto de lingvo (kiel historia fenomeno estiĝanta fonetike) estas tiel akcesora, ke ne gravas, en kiu lingvo oni ĝin legas... Efektive, lingvo estas grandega sfero oscilanta konstante, kun senfinaj variadoj, inter jenaj du polusoj: pura *esprimo* kaj pura *semantika interrilato*, tamen ne kvazaŭ kompromiso kaj miksaĵo el ili, sed kiel ege homogena fenomeno entenanta ambaŭ, kaj el kiu ili povas abstraktiĝi nur en limokazoj» (1)

Sed pri kio okupiĝas lingvisto? Oni diras kutime: «pri la lingva *signo*». Sed lingva signo, t.e. la produkto de la lingva ago en ĝia pleneco, ne estas (kiel aliaj signoj, ekzemple kiel gestoj, helpsignaloj, ktp.) io tute neanalizebla: male, ĝi estas analizebla. Oni povas disigi ĝin en morfemoj, vortoj, ktp., do en *lingveroj*, kiujn oni ankaŭ nomas, uzante dusencan terminon, *lingvaj* aŭ *lingvistikaj signoj*, ĉar fakte ili ne estas signoj, sed funkciaj elementoj, aŭ, pli esperante, *funkcioj* de la lingva signo; ilia ezo kaj esenco estas funkciado en supera amplekso (nome en la lingva signo). Kaj tiuj eroj ne estas funkciaj elementoj tute memstaraj, kies sumo rezultigas la lingvan signon, sed elementoj, kiujn oni povas konsideri ekzistantaj nur kiel funkciantaj en ĝi (nome en la lingva signo). Por eviti la dusencecon de la vor-

(1) M. Lucidi, «Prosodia e scienza del linguaggio», en: «Saggi linguistici», Napoli, 1966 pĝ. 167.

to «signo», Lucidi proponis nomi tiujn «funkciajn unuojn» *biposematoj* (esperante, eble, *signeroj*). Do lingvisto okupiĝas ne pri la lingva signo, sed pri la hiposematoj aŭ lingvaj «signeroj». Tio klarigas, kial lingvistoj kutime sentas sin ĝenataj, kiam ili devas studi la tiel nomatajn *holofrastikajn* (unuvojtajn) esprimajojn (kiel ekz-e: *jes, ne, dankon* ktp.), kiuj efektive ne estas hiposematoj (signeroj), sed *signoj* (2).

Tiu diferencigo inter «signo» kaj «signero» ne estas nur termina, sed havas multajn gravajn konsekvencojn; per tio, ekzemple, oni komprenas pli bone la tradician malsimpation kaj eĉ ĝenon de la oficiala lingvistika scienco antaŭ du problemoj: la problemo de la *deveno aŭ origino de lingvoj* (aŭ de la lingvokapablo), kaj la problemoj koncernantaj la *artefaritajn lingvojn*. Nome, la problemo de la deveno de la lingvoj koncernas la originon de la lingva *signo*, kaj ne de la *lingvaj signeroj* (kies origino estas pensebla nur en la amplekso de la lingva signo, en kiu ili funkcias, kaj kiun ili iel antaŭsupozas); plue, la problemo de la artefaritaj lingvoj koncernas ne tiom la kreadon de novaj signeroj (hiposematoj) (ĉar tio ĉi praktike ne estas io alia ol la studio de la lingva ŝanĝiĝo kaj de la lingva historio), se, en siaj plej ambiciaj klopodoj, la kreadon de novaj lingvaj *signoj*.

Vidante la tutan aferon el tiu ĉi vidpunkto, la lingva inventemo ŝajnos en sia unua aspekto kiel artefarita simiado de kelkaj fenomenoj de la natura historio de veraj lingvoj, simiado lingvistike studebla nur kiel eksternormaĵo de la lingvistika ago; en ĝia dua kaj pli ambicia aspekto, ĝia studado eliros el la propre nomata «lingvistiko», por eniri en la amplekson de la religia aŭ psikologia problemaro (magiaj formuloj, retrovo aŭ invento aŭ reinvento de la Adama pralingvo, ktp.), aŭ de sociologio (invento de internaciaj helplingvoj, ankaŭ nomata *interlingvistiko*).

2. Tipologio de la lingva inventkapablo

Sekve, povas esti utile skizi eblan teoriantipologion de la lingva inventkapablo. Oni povus, unue, skizi elementan tipologion bazitan sur la jam menciita poluseco de lingvo kiel *esprimo/art-ilo*, kaj kiel *rilatilo/komunikilo*. Alivorte, oni povus inventi lingvojn tute aŭ preskaŭ tute esprimajn/artajn por poeziaj aŭ esoterismaj celoj, lingvojn, kiuj estos ofte neregulaj, malfacilaj (kiel iuj lingvoj de primitivpopolaj sekretaj societoj, ekzistantaj ankaŭ dum nia Mezepoko, aŭ kiel ludlingvoj infanaj kaj knabaĝaj, aŭ kiel lingvoj de psikaj malsanuloj, ktp.); konsiderante plej grava la aspekton de rilato/komunikado, ni trovos lingvojn celantajn internacian interkomprenon (nome la propre-nomatajn internaciajn lingvojn, kiel, inter aliaj, Esperanto).

Sed oni povus ankaŭ preni kiel start-punkton la mistikan postulaton de Jakob Böhme kaj de la alkemiistoj, laŭ kiuj, per lingvo, homo povas trovi sian perditan diecon (ekzemple: serĉo de pralingvo Adama). Laŭ tiuj teorioj, se homo povus lerni vidi malantaŭ la aferoj de la ĉiutaga vivo (*signaturae*) la diajn aĵojn, kiujn ili reprezentas, li estus ree unuigita kun Dio kaj vorte kaj spirite. Tiu ideo multe gravis ĉe kelkaj inventantoj de filozofiaj lingvoj en la 17-a jarcento. Böhme kaj similaj saĝuloj, sub la influo de la parolmaniero de la Biblio pri la lingvo kaj la pralingvo (Genezo, II:19-20), konsideris la lingvon kiel sumon da *nomoj*, tute ignorante la lingvon kiel amplekson de *funkciaj unuoj*. Sed, se iu hipoteza inventanto de lingvoj de Böhme-a tipo komprenus la modernan ideon de «lingvo», li povus imagi al si (aŭ krei) iun magian/sanktuman lingvon ne nur formitan el nomoj, sed ankaŭ kun propra morfologio kaj sintakso, kiel la mezepoka Balaibalan, eble naskiĝinta en la 16-a jarcento en islama medio. Kaj en tiu direkto oni povus eĉ antaŭeniri al magia/dinamika lingvo, kies praktikaj ekzemploj, laŭ mia kono, eble ne ekzistas.

Ĉiam forirante de la Böhme-a ideo, sed sen forlasi la tradician koncepton de lingvo kiel *nomaro*, oni povus imagi al si diversajn tipojn de kabalistikaj formuloj (ne nur eblaj, sed konkrete ekzistantaj en la historio), nomojn dinamike simbolantaj transcendantajn entojn aŭ fortojn (ekz-e kvazaŭlingvoj kabalistikaj de islamaj Ĥurūfanoj, aŭ eble la *Ignota Lingua* de Sankta Hildegarda el Bingen). Aŭ, laikiginte la Böhme-an koncepton de la unua sanktuma pralingvo, tra la *Panglossio* de Comenius aŭ la *Numerlingvo* (pure helpa, kvankam ankoraŭ kvazaŭ-mistika) de J. J. Becher, oni alvenus al la ekstrema laikigo de la formullingvo en la modernan matematikan logikon kaj en la koncepton de mekanika traduko, kies anoncanto estas kelkfoje konsiderata la jam nomita Becher.

Do oni povus imagi du direktojn de lingva inventemo: direkton de sanktuma tipo, aŭ vertikalan, kaj alian, laikan, horizontalan. Krome, en ambaŭ direktoj oni povus imagi pluan partiĝon, kaj oni povus tiam postulati *kvar tipojn de inventitaj lingvoj*, laŭ la jena skemo:

A (sanktumaj):

1. *Sanktuma kvazaŭlingvo* (glosolalio, magiaj formuloj)
2. *Artefarita sanktuma lingvo* (ekz-e Balaibalan)

B (laikaj):

1. *Pure luda, esprima artefarita laika lingvo* (ekz-e lingvoj inventitaj fare-de knuboj aŭ fare-de paranojuloj)
2. *Artefarita lingvo por komunikado praktika*

En la lingvoj de tipo A-1 kaj B-1, pure esprimpluda nesocia (sanktuma aŭ laika) elemento precipas; en la lingvoj de tipo A-2 kaj B-2 la ĉefa elemento estas socia, komunikada (ankaŭ ĉi tie sanktuma aŭ laika).

(2) M. Lucidi, «L'equivoco de l'arbitraire du signe. L'iposema», en: «Saggi linguistici», cit., p. 72, noto 37.

Kelkaj hodiaŭaj interlingvistoj (3) eble povus skandaligi vidante magiajn formulojn, lingvojn de afrikaj sekretaj societoj, Esperanton kaj Interlinguan de prof. Gode pritrakitajn en la sama rubriko. Sed reale ekzistas komuna elemento en ĉiuj tiaj lingvoj: la sento de nesufiĉo koncernanta la lingvon normalan kaj naturan por esprimi pilargigitajn rilatojn, ĉu en direkto horizontala (laika), ĉu en direkto vertikala (sanktuma). Laŭ la alkemiistoj, la artefarita *alkemio* taŭgas por plirapidigi la evoluon agadon de la naturo; laŭ Leibniz aŭ Descartes, la naturaj lingvoj estas malperfektaj rilate la lingvon *filozofian* (en pli malnovaj tempoj oni dirus *sanktuman*); laŭ la moderna interlingvisto, la artefarita lingvo taŭgas ĝuste por plirapidigi la naturan iradon al la unueco.

Do oni povas skribi memstaran historion de «inventitaj» lingvoj, pritraktante el la sama vidpunkto ĉiujn tipojn, el-de la ŝamanaj lingvoj ĝis Esperanto kaj Interlingua, montrante, ke eĉ Esperanto kaj Interlingua estas laika moderna aspekto de la alkemio, sen tiel malpligrandigi ĝian gravecon. Mi pritraktis la problemon en libro germanlingva (4): ĉi tie mi nur prezentos kelkajn ekzemplajn, necese nekompletajn.

3. Mezepokaj sanktumaj lingvoj.

Kiel mi jam diris, eĉ primitivaj kulturoj jam konis Artefaritajn Lingvojn (mallongigo: ALojn), kvankam tiuj lingvoj ne estis jam Internaciaj Artefaritaj Lingvoj (mallongigo: IALoj). Ankaŭ ĉe nuntempaj «primitivaj» popoloj (eĉ se ili ne estas samaj kun la vere primitivaj pragraupoj, ili tamen povas proponi al ni interesajn indikojn) ekzistas klare duobla tipologio de ALoj. Nome, unuflanke, ekzistas ekzemple la *lingvo de la spiritoj* de eskimo-ŝamanoj, pritraktita inter aliaj fare de la rusa etnologo V.G. Bogoraz, uzita ankaŭ por mistikaj kantoj, aŭ ankaŭ la lingvoj de religiaj ekstazuloj, instruataj far-de spiritoj (tiu fenomeno aperis ankaŭ je la naskiĝo de la superaj religioj, vidu tiurilate la faman glosolalian de la prakristanoj). La kreintoj de tiuj lingvoj sin sentas posedataj de spirito aŭ demono, same kiel Ajakso, en la verko de Sofoklo (Ai. 243), kiu en sia frenezo parolis strangan lingvon «kiun neniu mortonto, sed demono instruis al li»: temas pri lingvo profeta, kiu poste povas laikiĝi en lingvon poezian. Aliflanke, ekzistas pli konsica inventado de ALoj por sekretaj societoj, por celoj

(3) Pri la senco de la vorto «*interlingvistiko*» vidu W. Manders, «Interlingvistiko kaj esperantologio», Purmerend, Muusses, 1950, recenzita en: «*Esperantologio*» (P. Neergaard), I(1950)2, p. 137, kaj ankaŭ: M. Monnerot-Dumaine, «*Précis d'interlinguistique générale et spéciale*», Paris, Maloine, 1960.

(4) A. Bausani, «*Geheim- und Universalsprachen*», Kohlhammer, Stuttgart, 1970. Aperis ankaŭ itala eldono en Romo, ĉe Ubaldini (1974): «*Le lingue inventate*».

pli ĝuste nomeblaj «sociaj»: unu el la plej bone studitaj inter tiuj lingvoj estas la AL de sekreta societo en okcidenta Afriko, rilatanta kun la tiel nomata ceremonio *Sigi*, ĉe la dogonanoj (5).

Tiujn primitivajn kaj religiajn aspektojn de lingva kreo oni retrovas ankaŭ, en pli sistema kaj teologia formo, en la okcidenta kaj islama Mezepoko. Eble ne multaj scias, ke ankaŭ en nia Mezepoko (la islama mezepokan kulturon oni povas konsideri kiel parton de la nia) ekzistas multaj klopodoj krei ALojn. Mi nur mencias du el ili, unu en la okcidenta kaj unu en la islama mondo. Sankta Hildegarda el Bingen (1092-1179), la tiel nomata «Sibilo de Rejno», fantaziema monaĥino, kiu vivis en la 12-a jarcento, en sia libreto *Ignota Lingua*, prezentis leksikonon enhavantan 920 vortojn rilatantajn je la homa kaj natura vivo (ekzemploj: ĉerizarbo = *grusimbuz*, pino = *gimeldia*, violo = *graxia*, ktp.). La celo de tiu lingvo, kiu limiĝas nur je la leksika parto, estas nekonata, kiel diras la nomo mem de la lingvo! Sed se ni pensas al la mistika etoso, en kiu tiu «lingvo» naskiĝis, ni povus facile imagi teoriumadon pri lingvo dia, instruita de Dio al Adamo, lingvo, kies spuro troviĝas ankaŭ en la *Dia Komedio* de Dante Alighieri (Paradizo: XXVI - 133). Laŭ Dante, en la Adama lingvo la nomo de Dio estis I. Tio rememorigas similajn spekulativojn kabalistikajn islamajn pri la litero *alif*, la unua litero de la araba aboco, simbolo de unueco kaj dieco: en la araba aboco la litero *alif* havas ekzakte la formon de nia majuskla litero I. Ĝuste en la islama Mezepoko, en kelkaj mistikaj medioj de Anatolio, aperis (eble en la 16-a jarcento) AL multe pli kompleksa ol la latinaj mezepokaj ALoj. Ĝia malsimpleco baziĝas sur la fakto — vere originala en tiu medio kaj epoko — ke ĝi estas vera kaj kompleta lingvo, *ne nur simpla nomaro*. Ĝi posedas gramatikon kaj sintakson plene inventitajn, kaj pro sia reguleco, klareco kaj genieco ĝi superas en kelkaj punktoj eĉ iujn novtempajn inventitajn lingvojn de la tipo de *Volapük*. La nomo de tiu ĉi lingvo estas *Bālaibalan*. Ĝia strukturo plene kontraŭdiras la ideon — ofte esprimatan — de lingvistoj plenaj de antaŭjuĝoj pri la neeblo de reala lingva inventkapablo. Ili (inkluzive Leiris, kiu studis la lingvon de la jam menciita sekretsocieto de la afrikaj dogonanoj), ĝenerale, asertas, ke en tiaj okazoj temas ne pri vera invento, sed pri kunmetado el vortoj kaj morfemoj jam ekzistantaj en «veraj» lingvoj, aŭ en pli malnova periodo de unu lingvo, aŭ de dialektaj elementoj. Sed en *Bālaibalan* vi vidas ampleksan inventitan leksikonon (temas pri pli ol 600 densaj paĝoj en araba skribo) kaj genian memstaran gramatikon de aglutina tipo kun propra sintakso. La nomo *Bālaibalan* signifas «*lingvo (bāl-) de (-a) la (-i) Viviganto (bal-: vivig-; -an: -anto)*».

(5) M. Leiris, «*La langue secrète des Dogons de Sanga (Soudan Français)*», Paris, 1948.

4. Humanismo, iluminimo, kaj lingva kreo

En Eŭropo oni komencis senti konscie la problemon de la lingvo internacia nur kiam la naciaj aŭ popolaj lingvoj jam atingis plenan memstaron kaj artan esprimivon, nome en la epoko de Humanismo kaj Renesanco. La islama Mezepoko, male, ne spertis ion similan je nia Renesanco, kaj la araba lingvo restis ĝis preskaŭ nia epoko la «latino» de la eminentularo de la araba kaj parte ankaŭ de la islama mondo. Post la malsukceso praktika de la humanisma klopodo revivigi la Ciceronan latinon, la 17-a jarcento metis la problemon sur novajn bazojn. Kun la letero de Descartes al P. Marin Mersenne (20.11.1629), kaj kun la ideoj de Leibniz, esprimitaj en verketoj malkovritaj kaj valorigitaj de Couturat en 1903, la lingva inventado, kiu en la mezepokaj Aĵoj aspektis kvazaŭ imitatio Dei (= Dio-imito), fariĝis homa raciigo de dia/natura agado. Kaj tio montriĝas en du direktoj, ambaŭ reprezentataj en la penso de ambaŭ filozofoj, Descartes kaj Leibniz, kiujn oni povas do konsideri kiel la anoncantojn ĉu de la lingvoj tiel diritaj *aposterioraj*, ĉu de la lingvoj nomataj *aprioraj*. Nome, unuflanke, ni trovas la revdeziritan filozofian lingvon, kies esenco, laŭ Descartes, estus la nombrado je ĉiuj simplaj ideoj, estigitaj per ilia kunmeto ceterajn ideojn, por konstrui, forirante de tiu bazo, «*une langue universelle fort aisée à apprendre, à prononcer et à écrire, et, ce qui est le principal, qui aiderait au jugement lui représentant si distinctement toutes choses, qu'il lui serait presque impossible de se tromper*» (= «universalan lingvon tre facile lerneblan, prononceblan kaj skribeblan, kaj, ĉefe, helpanten la juĝokapablon, tiel ke ĝi ne povus trompiĝi, ĉar tiu lingvo povus reprezenti al ĝi ĉiujn aĵojn klardistinge»). Temas pri speco de ideo-algebro, kiu ne plu havas ion naturan. Aliflanke, por praktikaj celoj, Leibniz proponas ankaŭ simpligon kaj raciigon de la latino. Kun rimarkinda moderneco (ŝajnas, ke al la formiĝo de tiu Leibniza ideo kontribuis lia elementa kono de la simplega strukturo morfologia de la ĉina lingvo) li diras, ke «la kazojn oni povas ĉiam forigi, ilin anstataŭante per vortetoj *de, ad*, kiel okazas en senfleksiaj lingvoj. Adjektivo kaj substantivo havos la saman formon. Pluralo ne estas bezonata...».

Estas la unua fojo, ke aperas la ideo de IAL aposteriora, kie nenio estas artefarita, krom la simpligo de la gramatiko. Ankoraŭ parte mezepokaj, nome trapenĉitaj de religiaj kaj fantaziaj konceptoj ŝajnas la interlingvistikaj teoriomadoj de Jan Amos Komensky (Comenius), fama ĉeĥa filozofo.

La 17-a jarcento (kaj grandparte ankaŭ la 18-a jarcento) spertas floradon de projektoj de filozofiaj aprioraj lingvoj, kelkaj ankaŭ genie strukturitaj (ĉefe la projektoj de Dalgarno /1626-1687/ kaj de Wilkins /1614-1672/), sed praktike neaplikeblaj. Interesa dekokjarcenta provo, kiu sekvas la sugestojn de Leibniz, estas lingvo inventita de germana scienculo sub la pseŭdonomo *Carpophorophilus* en 1734. Tiu projekto estis malkovrita de Couturat kaj Leau, kaj estas la unua provaĵo efektiva de IAL aposteriora. Laŭ novaj studoj, ŝajnas, ke Ca-

rpophorophilus estas Leibniz mem: temas pri speco de latino ekstreme reguligita. Miaj esperantistaj aŭskultantoj povos legi kun profito artikolon de L. Einstein, esperantisto kaj patro de la pli fama Albert, publikigita en la *Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto*, kaj aliajn ĝeneralajn verkojn esperantlingvaj kaj nacilingvaj (ekzemple la tre interesan *Historio de la mondlingvo* de Drezen), en kiuj diversaj projektoj de IALoj estas menciitaj (6).

5. Konstruo de IALoj dum la 19-a kaj 20-a jarcentoj

Ĉefe la 19-a jarcento vidas svarman multiĝon de IALoj, ĉu aprioraj, ĉu aposterioraj. Disvolviĝas la tekniko, la eŭropa kulturo ekkonscias pri sia forto, sed samtempe oni studas science la strukturon de aliaj lingvoj en aliaj kulturoj; la interrilatoj inter la ekstereŭropaj kaj la eŭropaj kulturoj pli iĝas (eĉ se en koloniisma direkto). Ĉar ĉi tiu parolado ne estas, kaj ne volas esti, sistema historio de IALoj, mi limiĝas je la mencio de kelkaj projektoj. Kvankam la filozofiaj lingvoj aprioraj daŭras aperi en ĉi tiu jarcento (eĉ ĝis nia epoko), ili ŝajnas destinitaj al malsukceso.

Inter la plej ofte menciitaj kaj kuriozaj ekzemploj troviĝas la *Langue musicale* (=Internacia Muzika Lingvo), aŭ *Solresol*, de la franco F. Sudre (kreita jam en 1817), kie ĉiuj vortoj konsistas el nuraj kunmetoj (kiuj povas esti multnombregaj) de la sep silaboj indikantaj la muzikajn notojn: do, oni povas ankaŭ, teorie, *kanti* la vortojn. Unu el la plej malfruaj idoj de la aprioraj lingvoj estas *Ro*, kreita de la usona pastro Foster en 1906, en kiu ĉiu fonemo havas klasifikan funkcion: tiel, «zinko» estas *baudfa*, «kadmio» estas *baudka*, «nikelo» estas *baulfa*, do temas pri vortoj konstruitaj sur tia sama bazo kiel la dekuma klasifiko, kies praktika uzado estas tre malfacila.

La plej bona ekzemplo inter la IALoj, kiujn oni povus difini «miksitaĵoj» inter la aprioraj kaj la aposterioraj, estas la iam fama *Volapük*, de Mons. Johann Martin Schleyer (1879). Volapük prezentas sin kiel sisteme aglutina lingvo kun radikoj estigitaj per deformado de naturaj nacilingvaj vortoj (ekz-e: *vol* = mondo, el la angla "world", kaj *pük* = lingvo, el la angla "speak"), kaj kreo de artefaritaj finaĵoj kaj morfemoj (-a estas genitivo, prenita el slavaj lingvoj, -e estas dativo, kaj -i akuzativo, samformaj kun la korespondantaj turkaj finaĵoj: ĉu hazardo aŭ konscio?).

Inter la aposterioraj lingvoj, oni ekdistingas lingvojn, en kiuj *reguleco* superregas ankaŭ malprofite al *natureco*, disde lingvoj, en kiuj, male, la natureco superregas domaĝe al reguleco. Inter la lingvoj de la unua subtipo troviĝas la

(6) La artikolo de L. Einstein troviĝas en «Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto» (16-a eld. 1939, pĝ. 256-268). Por plua bibliografio, vidu la artikolojn jam menciitajn en la antaŭaj notoj, kaj artikolon de Bruno Migliorini: «Artificiali, Lingue», en: «Enciclopedia Italiana».

nun plej disvastiĝinta IAL, Esperanto, de d-ro Zamenhof (1887), kiu tute elpuŝis Volapükon. En Esperanto la vere inventitaj elementoj estas malmultegaj: eĉ la radiko *edz*, kiun oni ofte mencias kiel unu el la inventitaj vortoj de la lingvo, efektive devenas de germana ina finaĵo *-essin*, *ekz-e* en *Prinzessin* (=princino), de kiu Zamenhof forprenis la inan eron (-in): Ceteraj vortoj devenas de la nacilingvaj vortoj, kiujn Zamenhof konsideris plej internaciaj. La sola artefarita elemento de Esperanto estas ĝuste ĝia absoluta reguleco kaj simpleco. Sed al Esperanto ni destino la lastan parton de ĉi tiu parolado.

En la 20-a jarcento ni vidas en la historio de la IALoj du tendencojn: tendencon al ĉiam pli vasta disvolviĝo de la ideo de IALoj aposterioraj kaj naturecaj, sekvante ekzemplon jam deknaujarcentan, nome *Mundolingue* de J. Lott (1890 - 1899), kaj tendencon al ĉiam pli forta kolektiva agado de komitatoj aŭ akademioj pli-malpli «sciencaj», kontraste kun la pli aŭ malpli genia agado de unuopuloj, tipa de la pasinta jarcento.

Oni ekkritikas kelkajn aspektojn de Esperanto, kaj naskiĝas provoj de reformo (Zamenhof mem komence petis kritikojn kaj sugestojn, sed la proponoj, kiujn li ricevis, estis tiel kontraŭdiraj, ke li preferis daŭrigi, kun nur kelkaj etaj modifoj, sian originalan projekton). La plej bona (aŭ eble la malplej malbona) el la tiel nomataj *esperantidoj* estas sendube *Ido* (Couturat – De Beaufront, 1908). Tiuj tendencoj al reformo de Esperanto direktiĝis al pli granda «natureco» de internacia lingvo. Sed «natureco» por kiuj? Klare, por la eŭropanoj, tute preteratentante la eventualajn postulojn de afrikanoj aŭ azianoj volantaj lerni IALon. Ni estas en plena epoko de eŭropocentra koloniismo, dum ke la sagaco de Zamenhof, kun lia sistemo de nevarieble kaj regule aglutina linvo, jam evitis la danĝeron de eŭropocentrismo. La ĉefa reprezentanto de naturecaj vidpunktoj estas *Occidental*, de la estona profesoro E. von Wahl (1922), poste rebaptita *Interlingue* ĝuste por eviti la akuzojn de «okcidenta provincismo» (sed *excusatio non petita... /nepostulata preteksto/*). *Occidental* – kiu ĝis nun akiris relative grandan disvastiĝon kaj estas sendube la plej bone konstruita inter la aposterioraj IALoj kun natureca tendenco – donas la impreson de speco de novlatino komuna, kun kelkaj anglaj elementoj. Ĝiaj propagandistoj pravas, kiam ili asertas, ke *Interlingue* estas unuavide komprenebla por eŭropa klerulo, sed skribi ĝin, estas pli malfacile pro la multaj esceptoj, kiujn ĝia kreinto allasis por «savi» naturecon. Inter la aposterioraj naturecaj IALoj, interesan pozicion okupas *Latino sine Flexione*, aŭ *Interlingua* (ne konfuzenda kun alia «*Interlingua*», la nuntempe propagandata ido de I.A.L.A. kaj de prof. Gode, kiu estas multe pli malfrua), kreita de la fama itala matematikisto Giuseppe Peano (1903). Li eliras de la leibniz-a ideo de simpligo de la komuna lingvo de la okcidenta kulturo, la latino. Oni povus paradokse diri, ke *Interlingua* de Peano estas ĉinigita latino (sed eble tio ne estas nur paradokso: Peano konis la strukturon de la ĉina lingvo, kaj unu el liaj disĉiploj, G. Vacca, transiris de matematika logiko al ĉinologio, fariĝinte profesoro pri ĉina lingvo ĉe la Roma Uni-

versitato). Peano uzis vortojn kun latina temato (ekz-e, por la nomoj, *rosa/rozol/*, *more/morol/*, *lupo/lupol/*, kaj por la verboj, *ama/amas/*, *time/timas/*, *jace/kuŝas/*, *fac/faras/*, ktp.); pluralo estas -s, sed oni uzas ĝin nur se ĝi estas nepre necesa; tensoj kaj modoj de la verbo estas abolitaj, aŭ, se nepre necesas ilin esprimi, ili estas anstataŭataj per vortetoj, kiel *iam* por la is-tenso, *debe* aŭ *vol* por la os-tenso, ktp.. La ĉefa valoro de Latino sine Flexione konsistas en la fakto, ke oni povas ŝpari la vortarojn, ĉar latinaj vortaroj jam ekzistas en preskaŭ ĉiuj lingvoj (sed ĉefe eŭropaj...), kaj ankaŭ en la ekstreme simpleco de ĝia gramatiko, kiun multaj IALoj povus envii al ĝi. Sed ĝia ĉefa problemo baziĝas sur la malfacileco adapti latinajn vortojn al la moderna vivo, aŭ, eĉ pli grave, sur la dubla senco, kiun kelkaj klasikaj latinaj vortoj povas havi por novtempa orelo (ekz-e: *ministro/klasike*: «servisto»/, *commissione/komenciĝo/*, *liberale/donacema/*, ktp.).

De la sama principo kiel Peano kaj De Wahl eliris la lingvistoj de I.A.L.A. (*The International Auxiliary Language Association*), societo fondita en Usono de geedzoj Morris en 1924 kun partopreno de reprezentantoj de multaj interlingvistikaj tendencoj kaj ankaŭ de fakaj lingvistoj, por studi la eblon de iu IAL, kaj efike lanĉi ĝin por internacia uzo. IALA studis tion dua multaj jaroj kun grandaj monrimedoj, kaj kun la kunlaboro de famaj scienculoj kaj lingvistoj, kaj fine, en 1951, aperis ĝia kreaĵo, *Interlingua*. Tiu projekto, sen ofendi prof. Gode, kiu realigis ĝin, kaj la lingvistojn, kiuj laboris kun li, rememorigas onin pri la fama proverbo de... la monto, kiu akusiŝ museton! Ĝi superas ankaŭ Occidental-on (*Interlingue*) en sia respekto por natureco eĉ domaĝe al reguleco, kaj alvenas ĝis la ekstremo konservi la tradician ortografion de latino (*philosophia* anstataŭ *filosofia*), kaj kontraŭmeti verbon kiel *redig-er* (redakt-i) al nomoj kiel *redact-ion* (redakt-ejo) kaj *redact-or* (redakt-isto), anstataŭ uzi la pli praktikan *redact-er* de Occidental (*Interlingue*). Diference de la simplega (por ne diri neekzistanta) gramatiko de Latino sine Flexione de Peano, *Interlingua* de IALA konservas tri konjugaciojn kaj multajn modojn kaj tensojn de la verbo, akceptas pasivajn kaj helpajn verbojn, ktp..

6. La lingvistika valoro kaj la internacieco fakta de Esperanto

Nia rapida ekzameno de la longa historio de la ALoj kaj IALoj nin permesis simpligi la variegan panoramon de IALoj (kiuj ankoraŭ svarmas, kiel rezulto de la bedaŭrinde ofte neutila laboro de «inventantoj de lingvoj», ofte ignorantaj la laboron de aliaj, kaj daŭre klopodantaj solvi problemojn jam solvitajn), elektante nur la vivokapablajn formojn de IALoj, kiuj fakte limiĝas je tri: *Esperanto*, *Occidental (Interlingue)*, *Interlingua-IALA*, aŭ eĉ al du, se la sufiĉe sim-

ilaj lingvoj Interlingue kaj Interlingua fine kunfandiĝos, nome do je Esperanto kaj Interlingue/a. Sed pro la flirto de IALoj kun la naturaj lingvoj, flirto tipa de la nuna fazo de interlingvistiko, la problemo de la internacia lingvo hibridiĝas. Nome, se IAL devas esti kiel eble plej simila al natura lingvo, kial ni ne elektos tute naturan lingvon jam ekzistantan? Kaj, el alia vidpunkto, tiu flirto povus rezultigi miskomprenojn de multaj scienculoj, kiuj kutime jam nenion komprenas pri interlingvistiko. Ekzemple, kiam Burney, en sia franclingva libreto pri la internaciaj lingvoj (7) tiel riproĉas Esperanton: «...*certaines différences stylistiques ne peuvent être traduites par cet idiome a un seul registre: comment rendrait-on, par exemple, en Espéranto, des textes argotiques, populaires ou familiaires?* (=... iuj stilaj apartaĵoj ne povas tradukiĝi per tiu unu-tona idiomo: kiel oni povus ekzemple traduki en Esperanton tekstojn slangajn, popularcajn aŭ familiarajn?)», li montras, ke li ne komprenas, kiuj estas la ĉefaj celoj de IALoj. Krome, IALoj estas fenomeno tute malsama de la ĝeneralaj lingvoj de la antikva tempo, kiel la akada, la aramea, la greka koinea, la latina, kiujn kelkaj interlingvistoj de la «natureca» tendenco, pliiĝante la konfuzon, volus kompari kun la nuntempaj IALoj. Kiam Stefano Bakonyi starigas tiun komparadon (8) por pruvi la ĝustecon de la natureca tendenco en la IALoj, kaj eĉ aldonas: «*Nek Interlingue nek Interlingue, kvankam ili proksimiĝas al la kriterioj, kiuj iam krein la akadan, aramean, kojnean, kaj latinan lingvojn, plene atingas ilin*», li montras (aŭ almenaŭ al mi ŝajnas tiel), ke li simple deziras adopon de pure *natura lingvo*, naskiĝonta per *spontana kunfandiĝo* de naturaj lingvoj.

Efektive je la bazo de ĉiuj tiuj projektoj naturecaj ekzistas pli-malpli koncisa eŭropocentrismo de koloniista tipo. Eble ne hazarde unu el la kreintoj de la multaj naturecaj IAL-projektoj. Weisbart, kiu inventis du aŭ tri neutilajn novajn IALojn, inter aliaj la tiel nomatan *Europal*, skribis en libreto, por lanĉi sian projekton, en 1932, tiun tre gravan frazon: «*La plej taŭga internacia lingvo devas esti lingvo kiel eble plej facila por kiel eble plej multaj homoj*», kaj aldonis, en noto sub «homoj»: «*nome, parolantaj eŭropajn lingvojn*»!

Do oni devus reklarigi kaj reprezenti la problemon en tiu direkto:

1. Temas pri la kreo kaj la disvastiĝo de *helpa lingvo*, ne de lingvo por skribi tekstojn en slango aŭ jargono. Tiajn tekstojn, klare, oni ĉiam skribos nacilingve aŭ eĉ nacidialekte!
2. Tia internacia helplingvo devos esti kiel eble plej *universaligebla en sia strukturo*.

(7) P. Burney, «Les langues internationales», Presses Universitaires de France, Paris, 1962, p. 94.

(8) En: «Mission ou démission de l'Europe», kaj en artikolo en «Cosmoglotta», n-ro 229, 1962, p. 53.

turo, kvankam ne necese en sia leksiko.

Mi jam pritraktis kelkajn miskomprenojn rilate la unuan punkton. Ni vidu nun, kiuj estas la miskomprenoj rilate la duan. Ekzistas interlingvistoj, aŭ kreintoj de IALaj projektoj, kiuj, ĝuste konsiderante la karakteron ne nur eŭropan sed tutmondan de vera IAL en nia postkolonia epoko, kredis solvi la problemon, enmetante en siajn lingvojn ekstereŭropajn elementojn morfologiajn, sintaksajn kaj leksikajn. Mi mencias nur la projekton *Interglossa* de Hogben (1943), kiu izolas latinajn kaj grekajn radikojn, kunmetante ilin laŭ ĉina sintakso: la rezultato estas hibrida kaj netaŭga miksaĵo. Ankaŭ tute netaŭga ŝajnas al mi alia projekto, *Loglan* (mallongigo de «Logical Language»), de J. Cooke Brown (1960), kiu bazigas sian vortaron sur statistika esploro pri la procenta disvastiĝo en la mondo de la ĉefaj lingvoj, kaj volus kredi al ni, ke, ekzemple, la plej taŭga vorto por esprimi la ideon de «blua» (koloro) estas la vorto *blanu*, ĉar ĝi enhavas tri fonemojn de la angla *blue*, tri de la ĉina *lan*, du de la hindustana *nila*, du de la rusa *galuboj*, du de la hispana *azul*, du de la franca *bleu*, kaj kvar de la germana *blau*. La azianoj mem ŝajnas rifuzi tian sistemon. En verketo titolita «Language Problem and World Unity», hinduniano, Bhabes Chandra Chaudhuri, alvenas al la konkludo, ke la elektota internacia lingvo povos esti nur lingvo (nacia aŭ artefarita) baziĝonta sur la okcidenta kulturo. Kaj tiu estas ankaŭ la opinio de multaj japanoj (kiuj ege interesas sin je problemoj de interlingvistiko), de ĉinoj, kaj de aliaj azianoj.

En tia situacio estas sendube, ke, inter la nunaj IALoj (kaj ni vidis, ke praktike nur tri taŭgaj lingvoj ekzistas), la IAL, kiu plej bone kontentigas la menciitajn postulojn, estas Esperanto. Klare, ankaŭ Esperanto estas elekto: nome, ĝi estas lingvo *leksike bindeŭropa*. Sed leksiko ne estas la plej ĉefa kaj tipa parto de lingvo, kvankam multaj interlingvistoj ŝajnas forgesi tion. Ni studu nun iomete pli profunde la strukturon de Esperanto. El la vidpunkto de la sintaksa «funkcia tipologio» de la pola lingvisto Milewski (9), Esperanto apartenas al la tipo, kiun Milewski nomas «subjektiva», la plej ofta inter la kulturaj lingvoj (de Azio kaj Eŭropo). Se ni evidentigas distinge la kvar ĉefajn sintaksajn abstraktajn rilatojn, nome:

1. Subjekto // netransitiva predikato (latina ekz-o: *Marcus dormit*);
2. Subjekto aganta // transitiva predikato (lat. *Marcus necat*);
3. Transitiva predikato // objekto de agado (lat. *necat leonem*);
4. Determinato // determinanto (lat. *domus patris*),

ni vidos, ke neniu lingvo ekzistanta esprimas ĉi tiujn kvar sintaksajn rilatojn per

(9) T. Milewski, «Typological Studies on the American Indian Languages», Krakovo, 1967.

kvar malsamaj formulaj eksponentoj. Indikante tiujn formulajn eksponentojn paj er literoj, oni povas havi ses malsamajn kunmetojn. La unua (a-a-b-c) estas la plej ofte renkontebla en la lingvoj de la mondo. Ĝi estas la sama en Esperanto:

- a. Marko dormas,
- a. Marko mortigas,
- b. mortigas leonon,
- c. la domo de la patro.

Por ke vi komprenu pli bone tiun distingon, mi diros, ke en alia tipo de lingvoj, ekz-e en la baska aŭ en la kaŭkazaj (kiel en la kartvela), ni havas skemon a-b-a-c. Nome: la objekto de la transitiva verbo havas la saman eksponenton formalan kiel la subjekto de netransitiva verbo, dum ke la subjekto de transitiva verbo posedas specialan eksponenton, nomatan «*ergativo*».

Sed interne de la sintaksaj funkciaj tipoj distingiĝas aliaj tipoj, formalaj. Estas ĉi tie, kie Esperanto malproksimiĝas de la hindeŭropaj lingvoj, prezentante tipon, kiun oni ĝenerale nomas «*aglutina*». En la aglutina tipo de lingvoj, ĉiu morfologia rilato esprimiĝas per unu, kaj nur unu, afikso nevariebla. Zamenhof mem klare konsiis pri tiu ne-eŭropa aspekto de sia lingvo, kaj skribis: «simila konstruo de lingvo estas tute fremda al la Eŭropaj popoloj», dum ke ĝi ne estas fremda, ekz-e, al popoloj parolantaj ural-altajajn lingvojn. Sed – kaj ĉi tie eble kuŝas la plej genia punkto de la zamenhova lingv-aranĝo – dum ke en naturaj aglutinaj lingvoj la afiksoj ne posedas sendependan vivon, en Esperanto ili povas ankaŭ esti uzataj kiel memstaraj vortoj; nome: ili povas esti izolitaj, kaj en tio Esperanto proksimiĝas ankaŭ al la tiel nomataj izolaj lingvoj (ekz-e la ĉina kaj la vjetnama, ktp.). Ni havas do lingvon kun tute eŭropa leksiko (aŭ, pli bone, internacia, ĉar nun multegaj eŭropaj vortoj estas uzataj en praktike ĉiuj lingvoj de la mondo) kun *funkcia strukturo de subjektiva tipo* (tipo, al kiu apartenas ne nur preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj, sed multaj aliaj), kun *formala strukturo de tipo aglutina, sed havanta, plue, la eblecon (realigeblan nur en lingvoj de tipo izola) apartigi kaj forpreni la unuopajn afiksojn, igante ilin uzablajn ankaŭ kiel sendependaj vortoj* (10). Tial, nur post la legado de mallonga klariga

(10) La origino de tiu ideo ŝajnas al mi sufiĉe klara. En tiu epoko, inter la lingvistoj superregis evoluismaj ideoj, laŭ kiuj la plej malnovaj lingvoj estis izolaj, poste aperis, per aglutinado de izolaj eroj, la aglutinaj lingvoj, kaj de ili, per fandiĝo pli forta de la diversaj eroj, venis la fleksiaj lingvoj. Kvankam tiuj ideoj estas nun konsiderataj kiel eraraj aŭ almenaŭ neprecizaj, ili sugestis al Zamenhof solvon vere feliĉan de la problemo de internacia lingvo. Tiu ĉi ne estas la sola ekzemplo pri tio, kiel Zamenhof – kelkfoje nekonscie – intuis, interesajn solvojn de interlingvistikaj problemoj (vidu ekz-e V. Setälä, «Lingva esprimkapablo kiel funkcio de la vorttrezoro», en «*Esperantologio*», 1/1, pĝ. 5; W.E. Collinson, «The Internationality of Some Esperanto Affixes», samloke, 1/2, pĝ. 81. Pri la kelkfoje nekonscia internacieco de Esperanto, vidu J. Bianchini, «*Cursus completus Esperanti*», S. Vito al Tagliamento, 1934, en kiu montriĝas hazardaj koincidoj inter Esperanto kaj eĉ aziaj kaj afrikaj lingvoj.

enkonduko, la parolanto iun ajn lingvon povas traduki iun ajn esperantan tekston helpe nur de vortaro. Sed ni lasu Zamenhof mem paroli pri tiu eco de lia lingvo, kiu faras Esperanton la plej reale internacia (en la senco de «tutmonda») inter la IALoj, malgraŭ ĝia eŭropa aspekto. (El «*Fundamenta Krestomatio*», pĝ. 248-249).

«Mi aranĝis plenan *dismembrigon* de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortojn en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el senŝanĝaj vortoj. Se vi prenos verkon, skribitan en mia lingvo, vi trovos ke tie ĉiu vorto sin trovas *ĉiam* kaj sole en unu konstanta formo, nome en tiu formo en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k.t.p. estas esprimataj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj. Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi dismembrigon de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne tra leginte antaŭe la antaŭparolon... li eĉ ne supozos ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia pastra lingvo. Tiel, ekzemple, la devenon de la vorto *fratino*, kiu en efektiveco konsistas el tri vortoj: *frat* (frato), *in* (virino), *o* (kio estas, ekzistas) (=«*Kio estas frato-virino*» = fratino) la lernolibro klarigas en la sekvanta maniero: «frato» = *frat*; sed ĉar ĉiu substانتivo en la nominativo finiĝas per «o», sekve: *frat'o*; por la formado de la sekso virina de tiu sama ideo, oni enmetas la vorteton «in», sekve *frat'in'o*; kaj la signetoj estas skribataj tial, ĉar la gramatiko postulas ilian metadon inter la apartaj konsistaj partoj de la vortoj. En tia maniero la dismembrigo de la lingvo neniam embarasas la lernanton; li eĉ ne suspektas ke tio, kion li nomas «finiĝo» aŭ «prefikso» aŭ «sufikso» estas tute memstara vorto, kiu ĉiam konservas egalan signifon, tute egale, ĉu ĝi estos uzata en la fino aŭ en la komenco de alia vorto aŭ memstare... Kaj tamen la rezultato de tiu ĉi konstruo de la lingvo estas tia ke ĉion kion vi skribos en la lingvo internacia tui kaj kun plena precizeco (per ŝlosilo aŭ eĉ sen ĝi) komprenos ĉiu, kiu ne sole ne ellernis antaŭe la gramatikon de la lingvo sed eĉ neniam aŭdis pri ĝia ekzistado».

Al mi ŝajnas preskaŭ vidi kontentecan rideton sur la lipoj de Zamenhof: «*La Eŭropanoj kredas, ke ili parolas eŭropan lingvon, parolante Esperanton, sed efektive ĝi havas strukturon, kiu ne estas eŭropa, sed universala!*».

Kiel mi jam diris, nur profitante de tiu genia trajto la lingvo Esperanto povos fariĝi vere tutmonda esprimilo, eĉ per esprimprovoj aŭ kunmetoj de vortetoj, kiuj, en la komenco, povas esti ŝokantaj el kelkaj tradiciaj eŭropaj esperantistoj. Ĉi tiu do estas la ĉefa vojo al reala internaciigo de IALo, kaj ne la inventado de miksitaj vortaroj aŭ ĉin-eŭropaj morfologiaj eltrovoj. Ne estas malfacile imagi al si, ke en la estonta tempo neŭtralaj frazoj kiel *Tio ĉi indas* anstataŭos pli kutiman eŭropan frazon *Oni devas fari tion*, ktp. Antaŭ kelkaj monatoj, mi legis plezure en maŭista libreto frazon kiel «la lingvo internacia *lernem-*

das kaj *lernindas*», en kiu oni profitas ĝuste de la malpli naciaj kaj malpli eŭropaj aspektoj de Esperanto: la ebleco originale ekspluati tiun ĉi tendencon de la lingvo estus preskaŭ senlima, kaj ni ne havas nun tempon por fari tro multe da ekzemploj. Eĉ sen troigi en tiu direkto, sendube, dum ke la lingvo estos pli kaj pli parolata de ne-eŭropanoj, la uzado de tro tipe eŭropaj idiomaĵoj devos esti malpliigita. Ekzemple, mi legis en la tre konata verko de I. Lapenna, «Retoriko» (Parizo, 1950, pĝ. 29) frazon jenan: «La lingvo, foje formiĝinte, mem influas sian propran bazon». Esprimmaniero kiel «foje formiĝinte» estas, mi pensas, ne facile komprenebla sen pripensado al Aziano (ĝi venas de la franca dirmaniero «une fois formée», kie «une fois», Esperante «foje», ne povas signifi «tuj post» por hindiano aŭ arabo). Utila ekzercado por esperantisto konanta lingvojn de diversaj neeŭropaj strukturaj tipoj povus esti scienca priskribo de tiuj strukturoj per Esperanto. Ekzemple, ekzistas amerik-indianaj lingvoj, en kiuj, por esprimi la ideon «tie estas domo», oni diras ion kiel «tie(ĝi)domas». La malaja verbo tute nekonas la verban tenon, sed povas esprimi per afiksoj aspektajn nuancojn, kiuj ne gravas morfologie por la eŭropaj lingvoj; Esperantaj prefiksoj kiel *ek-*, *el-*, ktp., eble povus esti uzataj por traduki ilin. Frazo kiel «Malfermu la fenestron» povas esti tradukata en hindustanan lingvon (hindian aŭ urduan) per «*kb-ikī-ko kholdo*» aŭ «*kbikī-ko kbolo*». La dua frazo signifas «Malfermu la fenestron», ĝenerale. La unua signifas «Malfermu la fenestron en la direkto de interne al ekstere», sed ne fizike: kontraŭe, psikologie: «Malfermu la fenestron por li, ne por mi». Eble oni povus uzi «ek-malfermu», aŭ «el-malfermu»?

Do, ĉu Esperanto estas perfekta? Nenio estas perfekta sur la tero. Sed mi kredas, ke oni povas aserti, ke, inter la IALoj, Esperanto estas la lingvo plej taŭga por iĝi vere internacia (t.e. tutmonda kaj ne nur tuteŭropa) helplingvo. Inter la kritikoj faritaj el Esperanto, la plej gravaj koncernas tri punktojn: artikolo, akuzativo, adjektiv-substantiva akordiĝo.

La artikolo (la), nekonata de multegaj lingvoj en la mondo, eŭropaj kaj ekstereŭropaj, estas ofte problemo. La akuzativo, kies uzado ne estas facila por multaj parolantoj eŭropajn kaj ekstereŭropajn lingvojn, ofte montriĝas baro. Samo koncernas la konformecon aŭ kunrespondecon en nombro kaj kazo de adjektivoj kaj substantivoj. Malgraŭ la multaj kaj ofte ĝustaj respondoj donitaj de esperantistoj al tiuj kritikoj (11), oni devas agnoski, ke parolanto la lingvon malajan, ekzemple, por esprimi la ideon «Ni vidas multajn grandajn palacojn kaj be-

(11) Zamenhof mem konsentis pri tio, ke «*la personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj) povas en la unua tempo tute ne uzi ĝin, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa*» («Fundam. Krestom.» pĝ. 8.). La artikolo de la fama esperantisto G. Waringhein («La akuzativo en Esperanto el teoria kaj interlingvistika vidpunkto», en «Esperantologio» 1/1 pĝ. 33) restas, malgraŭ lia profundeco kaj scienco, diskutibla, ĉar (al mi ŝajnas) Waringhien bazigas sian koncepton de «klareco» sur logiko de tipo *latina*.

lan ĝardenon», uzas frazon «*Kita libat banyak bangunan besar dan sabuah taman chantek*», nome ion kiel «*Ni vid mult palac grand kaj unu ĝarden bel», klare kompreneblan ankaŭ sen morfemoj (ĉiu vorto estas nevariebla, kaj morfologio preskaŭ ne ekzistas). Li malfacile ŝatus sistemon de esprimo (por li pli embarasan kaj malsimplan) de Esperanta tipo. La sama malfacilo ekzistus eble ankaŭ por ĉino.

Certe Zamenhof, tipa centreŭropa klerulo, kiu konis multajn lingvojn, sed ne la lingvojn morfologie simplegajn (kiuj ne pro tio iĝas dubasencaj) de la Malproksima Oriento, ĉiam iom suspektis, ke troa simpleco estas danĝera por la klareco. Eblajn ŝanĝojn en la direkto de plisimpligo ni ne povas ankoraŭ klare imagi: ĉio dependos de la efektiva disvastiĝo de Esperanto en la ekstereŭropaj landoj kaj de la efektiva praktika uzado de la lingvo.

Mi konkludas tiun ĉi bedaŭrinde tro longan paroladon [indikante la poeziajn verkojn de Zamenhof]. Ankaŭ en kampo poezia lia lingvo povos atingi ne antaŭvideblajn belajn kaj novajn rezultatojn, se nur la esperantistoj uzados nove kaj vere internacie ĝiajn ankoraŭ parte neekspluatitajn esprimrimojn.

Milano, 20.11.1971

preĝo

Ekde kiam la Homo akiris la rezonkapablon, li ekkomencis preĝi. Senfinaj estas la preĝoj kiujn oni sendis al superulo, sed eble neniu preĝo estas pli aktuala ol tiu-ĉi, kiun verkis la estro de indianoj Sioux, Flava Alaŭdo.

Ho Granda Spirito, kies voĉon mi aŭdas en la ventoj
 kaj kies spiro donas vivon al la tuta mondo, aŭskultu min!
 Mi venas al Vi, unu el Viaj multnombraj filoj.
 Mi estas eta kaj malforta.
 Mi bezonas Vian forton kaj Vian saĝecon.
 Lasu ke mi marŝu tra la belaj kreitaĵoj
 kaj permesu ke miaj okuloj admiru la ruĝoran sunsubiron.
 Faru ke miaj manoj respektu tion kion Vi kreadis
 kaj ke miaj oreloj estu pretaj aŭskulti Vian voĉon.
 Donu al mi saĝecon, por ke mi konu la aĵojn
 pri kiuj Vi instruis miam popolon,
 la lecionojn kiujn Vi kaŝis en ĉiu folio, en ĉiu ŝtono.
 Mi petas forton, ne por superi miajn fratojn,
 sed por sukcese venki miam plej grandan malamikon:

mi mem!

Faru ke mi ĉiam estu preta veni al Vi,
kun puraj manoj kaj malfermitaj okuloj,
por ke, kiam la vivo svenas kiel la lumo ĉe la sunsubiro,
mia spirito venu al Vi senhonte.

esperantigis Mario Dazzini

11a internacia konferenco

programo de la 11a Internacia Konferenco de ILEI en Luksemburgo

Merkrede - 07.13

- 20.00 - ĉiuj konferencanoj estu en Holiday Inn
20.00 - La hotelestro ofertas al ĉiuj bonvenkoktelon.
21.30 - Gekolega renkontiĝo: la estraro persone salutas la ĉeestantojn.
22.00 - Kunsido de ILEI-estraro kaj de Loka Organiza Komitato.

Jaŭde - 07.14

- 10.00 - Solena Inaŭguro de la konferenco - Salono en Holiday Inn
Programeto:
1) Muzikaĵo aŭ legaĵo
2) Salutado de la gastoj kaj konferencanoj
3) Salutvortoj de la gastoj kaj de la sekiestroj
4) Festparolado de la ĝenerala sekretario de ILEI: «La estonto de Eŭropo sen komuna lingvo».
20.00 -
1) Enkonduko en la laboron de la semajno kaj programasaĝoj
2) Diskutado kaj aldonaj deziroj flanke de la ĉeestantoj
3) Niaj zorgoj kaj sugestoj.

Vendrede - 07.15

- 9.00 - Malfermo de la laboroj.
- Formiĝo de stud-kaj laborkomisionoj:
1) Komisiono por ĝisdatigo en la instrumentoj kaj lernolibroj;
2) Komisiono por preparo de Regulaĵo pri organizado de ILEI-konferencoj kaj Seminarioj;
3) Komisiono por pristudo de sciencaj rezultoj de la eksperimentoj en Regionoj 1 kaj 2;
4) Komisiono por partopreno al la projekto pri Asociiĝintaj Lernejoj de Unesko;
5) Komisiono por preparo de Internacia Simpozio pri Interlingvistiko por scienca kontrolo de Esperanto ĉe Universitato Eötvös Lorand en Budapeŝto;
6) Komisiono por fondo de ILEI-biblioteko: preparo de Statuto kaj regulaĵo;
7) Komisiono por interŝanĝo de klasvizitoj kaj korespondado;
8) Komisiono por preparo de Internacia Simpozio ĉe Universitato Sorbonne en Parizo;

- 9) Komisiono por preparo de Monda Ekspozicio de Infandeseĝaĵoj ĉe Unesko en Parizo;
10) Komisiono por preparo de ILEI-konferenco en Afriko.
17.00 - Kiamaniere moderne instrui esperanton - Spertoj kaj praktikaj provoj de kolegoj partoprenantaj la konferencon.

Libera vespero

Sabate - 07.16

- 9.00 - S-ro Reuland: «La leceburga lingvo».
11.00 - Direktoro Jozefo Ingusz: «Analizo de ILEI-sekcioj en la socialismaj landoj - Kreo de kunordiga subcentro en Budapeŝto».
17.00 - Prelego de prof. Istvan Szerdahelyj pri: «La sciencaj rezultoj de lingva eksperimentado».
20.00 - Malstreĉado (ŝercoj - kantado - humuraĵoj k.t.p.).

Dimanĉe - 07.17

- 9.00 - Katolika diservo celebrata de Pastro Hansjörg Kindler
10,30 - Prelego de Prof-ro D-ro Mario Dazzini: «Paŭlo kaj Franciska» el la 5a kanto de la Infero el la Dia Komedio de Dante.
17.00 - Prelego

Lunde - 07.18

- 9.00 - Vizito al instancoj
17.00 - Prelego de s-ano Gaston Turin, vicsekretario de ILEI, pri: «Kunlaboro kun FIMEM».
18,30 - D-ro Prof-ro Mario Dazzini: «Kiel organizi kaj funkciigi ILEI-sekcion».
20,30 - Malstreĉado (ŝercoj-kantado-ludoj - humuraĵoj - skeĉoj)

Marde - 07.19

- Tuttaga ekskurso

Merkrede - 07.20

- 9.00 - Kunveno kun gvidantoj en la instrustaj unuigoj, kun inspektoroj kaj eduk-

- ministeriaj reprezentantoj - Diskutoj
16.00 - Raportoj de la sekiestroj pri la instruado de esperanto en la lerneja jaro 1976-1977 kaj pri la vivo de la sekcioj.
20.00 - Salono en la ĉefurbo - Magia vespero aŭ pupludo kun TRIKSINI (S-ro Hansjörg Kindler)

Jaŭde - 07.21

- 9.00 - Vizito al Universitato kaj lernejoj.
16.00 - Bruĉjo Kasini - Prelego pri «Ĉu amorfaj integriĝo aŭ kreiva kunlaboro?».
18.00 - Gaston Turin - Bruĉjo Kasini - Mario Dazzini «Pri Internacia Pedagogia Revuo - IPR».

Libera vespero

Vendrede - 07.22

- 9.00 - Kunsido de ILEI-komitato
Raportoj de la
1) Prezidanto
2) Vicprezidanto
3) Ĝenerala sekretario
4) Vicsekretario
5) Kasisto
Diskutado kaj decidoj

Posttagmeze oni veturos al Esch/Alzette, la dua plej granda urbo de Luksemburgujo

- 15.00 - Vizito de la «Foyer de la Solidarité», t.e. hejmo kaj lernejo por kriplaj aŭ/kaj mensmalsanaj infanoj.
18.00 - Akcepto en la urbodomo de Esch/Alzette
19.00 - Manĝo komuna en gastejo
20.00 - Vizito de la presejo de «Tageblatt», la dua plej granda Luksemburga gazeto.
22.00 - Reveturo al Luksemburgo.

Sabate - 07.23

- 9.00 - Laborplano por 1978 kaj perspektiva agado de ILEI ĝis 1979 - Fondo de novaj sekcioj.
- Planado kaj fiksado de la programo de XXIIa Internacia Konferenco de ILEI.
17.00 - Konkludoj, decidoj, rezolucioj.
20,30 - Adiaŭa vespero.

Dimanĉe - 07.24

- Forveturo de la konferencanoj.

ĉu esperanto en la eŭropa komunumaro?

La Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj kaj la Eŭropa Esperanto-Centro jam dum multaj jaroj havas bonajn rilatojn kun la Centro por Eŭropa Edukado en Bruselo. Tiu centro estas la unua eŭropa instanco kiu eldonas gazeton en Esperanto «Eŭropa Dokumentaro». La centro ankaŭ publikigas artikolojn pri esperanto en siaj alilingvaj eldonoj kaj volas helpi al la enkonduko de esperanto en eŭropaj instancoj.

Je la fino de 1975 la nombro da abonantoj estis 800 kaj ni esperis baldaŭ atingi la nombron 1000 por publikigi pli belan gazeton. Bedaŭrinde la nombro falis ĝis 423 an 1976 kaj nun estas eĉ pli malalta. Kie estas niaj antaŭaj kaj novaj abonantoj konvinkitaj ke esperanto estas *LA SOLVO* por la lingva problemo en Eŭropo? Ĉu ili ne plu estas interesitaj pri eŭropaj aferoj kaj pri intergriĝo de eŭropaj popoloj?

Post daŭra informado nun kelkaj eŭropaj instancoj montras pli da intereso por esperanto. Dum la kongreso en Ateno ĉeestis oficiala EEK-reprezentanto.

Ankaŭ kelkaj semajnoj Dr. Denöel nome de la Eŭropa Esperanto-Centro, parolis en Bruselo kun S-ro Sidet, fakestro pri informado en la Eŭropa Komisiono.

Dum tiu renkonto reciproka informado kaj dissendo de informmaterialo estas oficiale akceptita.

Multaj parlamentanoj ne plu konsentas pri la multekosta lingva ĥaoso en la komunumaro kaj niaj aktivuloj por parlamenta agado kaj eksteraj rilatoj konstatas pli da interesiĝo por esperanto en pluraj EEK-landoj.

Ankaŭ ni montru intereson por eŭropaj aferoj! Baldaŭ ni devas elekti por Eŭropa Parlamento kaj pli kaj pli oni decidas en Bruselo kaj Luksemburgo, kio okazos en Eŭropo. Ekemple, la ministroj pri edukado de la naŭ jam decidis pri instruado de unu fremda lingvo al ĉiuj infanoj en Eŭropo. Komprenible ili ne konsentis *kiu* lingvo.

Se ni ne volas perdi la rilatojn kun eŭropistoj kiujn ni atingis post multe da labore, ni ankaŭ devas montri intereson por eŭropaj aferoj, La minimumon kiun vi povas fari estas aboni «Eŭropa Dokumentaro», ĉe via libroservo, ĉe UEA, aŭ rekte ĉe la Centro por Eŭropa Edukado, rue de Vceweyde 37, B-1070 Bruselo. La prezo estas 180 belgaj frankoj (aŭ egalvaloro) por 4 numeroj.

La antuaj jaroj

En la jaro 1968 kiel departementa respondeculo pri instruado mi organizis la unuan – departementan – studkonkurson en urbo Gyula. Post unu jaro, vidante la sukceson, ni povis aranĝi jam la unuan tutlandan studkonkurson. De tiam, ĉiujare ni aranĝas la studkonkurson kiel aranĝaĵon de Hungara Esperanto-Asocio. En Hungarujo, la penso de studkonkursoj por gelernantoj havas abundriĉan tradicion. La lernejoj ĉiujare organizas studkonkursojn el diversaj lernejoj lernobjektoj: fiziko, ĥemio, lingvoj, slojdo ktp. Ni adaptis tiun jam elformitan sistemon al Esperanto.

Celoj de la studkonkurso estas la sekvaj:

1. Doni eblecon por la gelernantoj montri la akiritan lingvoscion. Multfoje mem la konkurso helpis al la gelernantoj renkonti samaĝajn kunulojn, kiuj simile okupiĝas pri Esperanto.
2. La studkonkurso povas montri al la ĵurio, kiuj junuloj montras lingvan talenton. Tiu fakto povas kontribui al tio, ke la plenkreskaj esperantistoj ekkonu la estontajn esperantistojn.
3. Tiuj gelernantoj, kiuj multfoje venas el malgrandaj vilaĝoj aŭ urbetoj, kie mankas vigla Esperanto-vivo, povas renkontiĝi kun la movado. Ni povis sperti, ke dum la daŭro de la jaroj, la junaj esperantistoj ekkonis unu la alian, formiĝis literamikecoj. Ĝenerale ni povas diri, al multaj talentaj gelernantoj la studkonkurso donis la unuan pozitivan impreson rilate al nia movado.
4. Ne eblas preteratenti tion, ke por la studkonkurso, lernanto devas pli profunde eklerni la lingvon, pli precize tiun parton, kiu estas destinita por certa aĝo. La prepariĝo al la konkurso helpas la pli bonan sinpretiĝon.
5. Pri la instruistoj ni spertis, ke la plej seriozaj instruistoj instigas la gelernantojn partopreni la studkonkurson. Ili pliokupiĝas kun la plej bonaj gelernantoj, do klopodas plie pretigi ilin al la studkonkurso.
6. Hea kaj ceteraj hungaraj instancoj donacis multajn valorajn memorobjektojn, librojn Esperantlingvajn por la gajnintoj. Ili sukcesis aranĝi, ke pluraj gajnintoj ricevu de la *pionira organizo*, eblecojn partopreni internaciajn tendumadojn. Tie, la gajnintoj en vera esperantista medio povas renkontiĝi kun la movado. Dufoje donis eblecon Hea partopreni la Infankongreseton – en Kopenhago kaj Vieno, por la plej bonaj geinfanoj.

Resume, la studkonkurso povas instigi la gelernantojn por pli profunde ekoni la lingvon, kaj donis eblecon por la renkonto kun la movado. Ambaŭ atingiĝoj baziĝas je la aktiva kungvoscio. Post pluraj jaroj kristaliĝis la nun uzata konkursosistemo. Ĝi devis doni eblecon por 10-18 jaraj gelernantoj. La plej malhelpa estis tiu cirkonstanco, ke ĝen-

erale oni instruas diversajajn gelernantojn en la sama klubo aŭ rondo. Nur post kelkaj konkursoj ni konvinkiĝis, ke ne estas permeseble konkursigi ne samaĝajn gelernantojn! — Kvankam, ili eble vizitas la saman ekz. porkomencantan kurson. Kiel konkursbazon ni rigardis la lernolibron Esperanto Internacia de Szerdahelyi. Tiun lernolibron ni dividis je 4 partoj, kiuj kongruas al 4 aĝoj. (aŭ «klasoj», kiel ni ofte diras). Tiuj opaj partoj estas konvenaj al 10-14 jaroj. Por la mezlernejoj ni elektis la lernolibron de Julio Baghy.

Ĉiu aĝogrupo (klaso) devis posedi la gramatikon kaj leksikon de la jam menciitaj libropartoj. La paroligo baziĝis sur tiu lingva materialo. Tiel ni evitis, ke la pliaĝaj partoprenantoj superu la pli junajn, en la sama grupo. Jam kvar jarojn ni uzas la saman postularon por la departementskalaj konkursoj, kaj por la tutlanda studkonkurso.

Dum la *departementaj studkonkursoj* la lokaj ĵurioj konkursigas la gelernantojn, kaj elektas la plej bonajn. Nur la plej elstaraj rajtas partopreni la *tutlandan studkonkurson*. La ĵurio elektas po unu lernanton el ĉiu aĝogrupo.

Ni uzas la sekvan postularon por la studkonkursoj departementaj kaj tutlandaj:

3. *Skriba parto*: La partoprenantoj ricevas surloke testfolion.

Ĉiuj opaj taskoj havas poentovaloron. Testfoliojn ricevas la elementaj klasoj 5-8aj, kaj la mezlernejaj klasoj 1-2aj. La gelernantoj vizitantaj la trian kaj kvaran mezlernejajn klasojn ricevas tekstojn gepatrolingvajn tradukendajn al Esperanto, respektive inverse. La uzado de vortaroj estas permesata por tiuj, kiuj faras nur la tradukajn taskojn. La gelernantoj, kiuj vizitas la 5an klason, partoprenas nur la skriban parton.

2. Parola parto:

1. *Konversacio* — Du gelernantoj devas konversaciadi pri donita temo. La ĵurio observas la parolkapablon. La konkursantoj devas priatenti, ke la enhavo estu riĉa, stile bela, kaj konforma al la lingva situacio.

La temoj de la konversacio:

Por la anoj de la 6a klaso: Zamenhof, — Unu tago en la lernejo, — Via familio, hejmo, — Kiu estas Vi? (interkonatiĝo).

Por la anoj de la 7a klaso (Krom la temoj de la 6a klaso): Ekskurso, — Veturado al la studkonkurso, — Aĉetado en iu butikoj,

Por la anoj de la 8a klaso (krom la supraj temoj): Kion vi scias pri Hungarujo? (oni povas elekti ekz-e alian laŭplaĉan landon) — Pri pionira (skolta) vivo.

Por la gimnazianoj, 1a klaso: Vizito ĉe via parenco aŭ amiko. 2a klaso: Kiu profesion vi elektos? 3a kaj 4a klasoj: Prezentu vian urbon al iu eksterlandano!

Ĉiu partoprenanto devas scii la temojn de la antaŭaj klasoj!

3. Perbuŝa klarigo de gramatikaĵoj kun ekzemploj.

4. *La gelernantoj* estu kapablaj memstare doni respondojn al la sekvaj primovadaj, literaturaj demandoj:

1. Kiam okazis la unua Kongreso kaj kio estis ĝia signifo?

2. Menciu kelkajn Esperanto-gazetojn, kiuj aperas en Hungarujo? (Rimarko:

kompreneble tiun demandon oni povas konformigi al la opaj landoj.)

3. Diru parkere la Esperanto-himnon!

4. Ĉu Zamenhof verkis originale?

5. Diru vicorde la kongresojn, kiujn partoprenis Zamenhof mem!

6. Ĉu vi konas kelkajn Esperanto-aranĝojn nuntempajn?

7. Mallonga biografio de Julio Baghy.

8. Mallonga biografio de Kolomano Kalocsay.

9. Mallonga biografio de Antoni Grabowski

10. Mallonga biografio de Kazimierz Bein (Kabe).

11. Kion vi scias pri *Literatura Mondo*?

12. Kion signifas la jenaj mallongigoj: UK — ILEI — IFEF — MEM — UEA.

13. Kion vi scias pri la gazeto Paco?

14. Kion signifas PIV? Diru kelkajn frazojn pri PIV!

Nota: demandoj 5, 9 kaj 10 estas nur por mezlernejoj; la aliaj por ĉiuj.

5. **Ĉiu konkursanto pretigu albumon**, en kiun la posedanto kunkolektis diversajn notojn pri Esperanto kaj movado, la ricevitaĵojn bildojn, bildkartojn, leterojn, memoraĵojn ktp. Respegulu la kolektaĵo (albumo) la vivon kaj la movadon de la koncerna lando.

Uzante la albumon, la partoprenantoj estu kapablaj konversaciadi kun la ĵurianoj pri la enhavo de la albumo, ties pretigado ktp. Kompreneble la albumo la partoprenantoj ricevas post la konversaciado.

La ĵurio pritaksas la konkursantojn po persone. La opajn taskojn (1-5) la ĵurio poentigas de nulo ĝis dek. Ĉiu ĵuriano memstare, ope donas la poentojn. Okaze de egalnombro de poentoj, decidas la prezidanto de la ĵurio.

La studkonkurson rajtas partopreni tiuj gelernantoj, kiuj posedas la vortojn, kaj la gramatikajn erojn de la subaj lernomaterialoj:

Elementlernejoj, surbaze de la lernolibro: Esperanto Internacia:

5-a klaso: 1-6a lecionoj.

6-a klaso: 1-12a lecionoj,

7-a klaso: 1-18a lecionoj,

8-a klaso: 1-24a lecionoj.

Mezlernejoj devas scii la enhavon de lernolibro de Julio Baghy:

1-a klaso: 1-8a,

2-a klaso: 1-16a,

3-a klaso: 1-24a,

4-a klaso: 1-32a lecionoj.

Tiuj gelernantoj, kiuj lernas Esperanto po 3 aŭ pli horojn semajne devas konkursi laŭ la Esperanto Internacia:

5-a klaso: 1-12a,

6-a klaso: 1-24a lecionoj.

7-a klaso: Uzante la lernolibron Esperanto 2 (de Szerdahelyi), devas scii la unu-

la hungaraj konkursoj

an duonon de la lernolibro.

8-a klaso: Dua duono de la Esperanto 2.

Ni ne atentas, en kiuj formoj la gelernantoj interne de la supraj kategorioj, aŭ semajne kiom da studhoroj okupiĝas pri Esperanto. La principo de la grupigo estas nur la aĝo de la gelernantoj resp. la klaso.

Niaj proponoj por internaciigi la sistemon de la Studkonkurso

Mi estas konvinkitaj, surbaze de 8jaraj spertoj, ke la skizita formo de la Tutlanda Esperanto-Studkonkurso estas aplikebla al ĉiu lando, kie Esperanto estas aplikebla al ĉiu lando, kie Esperanto estas instruata. Komprenible, ni devas rafinigi iomete la suprajn kondiĉojn, la temaron ktp. Sed ni povas transpreni kaj proponi al la landaj Instruaj Komisionoj la sistemon de la konkurso.

Ni proponas:

1. Por elementaj lernejoj ni uzu ĝenerale la lernolibron Esperanto Internacia. Ne la teksta enhavo estas por ni grava sed la *morfemoj kaj gramemoj*. Tiuj kune estas la elirpunkto por unuecigi la postulojn.

2. Ĝis hodiaŭ ne ekzistas internacia libro por la pliaĝaj gelernantoj (15-jaraj). Ni proponas, ke la lernolibro de Szerdahelyi *Esperanto 2* fariĝu internacia libro. Surbaze de tiu ni povas ellabori la postularon por la tn-aj mezlernejanoj, kiuj fakte ne povas esti mezlernejaj gelernantoj, sed 15-18 jaraj gejunuloj.

3. Antaŭ ĉio oni devas akcepti la penson de Studkonkurso de opaj landaj asocioj, kaj aranĝi studkonkursojn *enlandajn*. En la unuaj jaroj ni povas akiri naciajn spertojn.

4. Post difinita tempo — ŝajnas al mi konvene, ke tiu estas almenaŭ 2-3 jaroj, ni povos aranĝi Internacian Studkonkurson.

5. La donita postularo de Hungara Esperanto-Asocio estas nur propono, sed ni devas aldoni, ke tiu formo — en grandaj trajtoj, precipe la I-V, punktoj — iĝis koverna por ni, dum 8jaraj spertoj.

La aŭtoro estas preta transdoni la spertojn, kaj partopreni en la ellaborado de la programo de Internacia Studkonkurso de Esperanto.

Estraro de ILEI

Prezidanto:	Rektoro Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42 D-315 Peine (Fed. Resp. Germanujo)
Vicprezidanto:	Direktoro Johano Ingsuz, Liget út. 40, H-1102 Budapest X, (Hungarujo)
Sekretario:	D-ro Mario Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa C., (Italujo)
Vicsekretario:	S-ro Gaston Turin, 43 Rue Emile Magnin, F-25300 Pontarlier (Francujo)
Kasisto:	S-ro Olle Osson, Bantorget 3, S-222 29 Lund (Svedujo). p.ĝ.k. Stockholm 682 117-7.

Sekciestroj de la Ligo

Aŭstralio:	Ivan Th. Maddern, Box 411, Morwell, Victoria 3840
Aŭstrujo:	Ernst Rixner, Kleingasse 6 - 18/8/13, A - 1030, Vieno
Belgujo:	G. Pirlot, Residentie «Vaughan», Kemmelbergstraat 3-5/b.3 B-8400 Oostende
Brazilo:	Elvira Fontes, Caixa Postal 5888, São Paulo
Britujo:	Hilary Chapman, 7 fairacre road, Barwell, Leicester, LE9 8HH.
Bulgarujo:	Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia
Danlando:	Lis Thune, Brembärvänget 15, DK-2650 Hvidovre
Finnlando:	Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo:	F. Le Magadure, 23 Rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont
F.R.Germanujo:	Hermann Behrmann, Ellerbuscher Str. 81, D-4972 Löhne 1
Grekujo:	Sokrates Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Kato Patissia, Ateno (816)
Hispanujo:	Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante
Hungarujo:	Marta Cser, Zelau út. 10-14, H-1368 Budapest V
Islando:	Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavik
Israelo:	Reuven Alberg, str. Kraus 12, Tel-Aviv, Ramat Aviv
Italujo:	Catina Giulia Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C.
Japanujo:	Fusakugu Kido-Gamoo Higasi 6-51 - Kosigaja Saitama, 343
Jugoslavio:	Miodgrad Stojanović, Duruntorska ul. 2/IV-32, YU-11000 Beograd
Kanado:	George du Temple, 930 Ardmore Drive, R.R.2, Sidney, B.C. V8L 3S1
Kolombio:	Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellin
Koreujo:	Dae Young-Rhie, 240-19, Sang-do-2-dong, Yong-dung-po Ku, Seoul
Nederlando:	O. Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1719 Schoorl
Norvegujo:	Elna Matland, Brekkeveien 50, N-4200 Sauda
Nov-Zelando:	Gwenda Sutton, 1 Wood Street, Upper Hutt
Pollando:	
Rumanujo:	
Sanmarino:	Prof. Marina Michelotti, via XXV marzo 73, I-43031 Rep. S. Marino
Sovet-Unio:	Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV Nikolaj Starodubčev, poŝtrestante, SU-340047 Doneck
Svedujo:	Olle Olsson, Bantorget 3, S-222-29 Lund
Svislando:	
Usono:	John L. Lewine. West Stockbridge, MA 01266

Kunlaborantaj organizoj aŭ izolitaj membroj

Ĉeĥoslovakujo:	Karel Kraft, poŝta 5, Zdaboř V-28, CS-261 05 Přebraz
Germana D.R.:	Ludwig Schödl, Rosa-Luxemburgstr. 37, DDR-195 Neuruppin
Kubo:	Pedro Pablo Lamas Díaz, Apartado 223, Ciego de Avila
Luksemburgujo:	Albert Wickler, 1, rue de Kehlen, L-Olm
Malagasujo:	Prof. Eugene Raveloson, BP 127, Tananarive,
Zairujo:	Antome-Samuel Ngangu, BP 13, Lukala (Nkandu)
F.I.M.E.M.	Fédération Internationale de Mouvements d' Ecole Moderne
U.E.A.	Universala Esperanto-Asocio

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)

Oficiala organo de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)

Aperas trifoje jare.

Redaktis: G. Turin
43, rue E. Magnin
F - 25300 Pontarlier

Konto: Poŝtĝirkonto: Stockholm 682 117-7
Olle Olsson, Bantorget 3
S-222 29 Lund (Svedujo)

Jara abono: 16 svedaj kronoj aŭ egalvaloro.

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI.

Nemembroj de ILEI povas pagi al la supre indikita konto.